



33^a INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO Giulianova (Abruco), 8^a - 14^a de aprilo 2009

Nuligita kaj anstataŭigita per volontula agado
helpe al abrucanoj frapitaj de la katastrofa
tertremo okazinta la 6^{an} de aprilo 2009



IJF-teamo pozas antaŭ la veturilo, kiu kondukos la kolektitajn varojn al la Civitana Help-Organizaĵo, por ke ili atingu la homojn senhejmigitajn de la tertremo okazinta la 6^{an} de aprilo 2009 en centra Italio.

Oficiala raporto

Ekde la 8^a ĝis la 14^a de aprilo 2009 devintus okazi en Giulianova, ĉemara urbo en la centritala regiono Abruco, la 33^a Internacia Junulara Festivalo.

Ĝis la antaŭa dimanĉo estis kolektataj entute pli ol 80 aliĝoj, el 16 landoj: Ĉeĥio, Finnio, Francio, Germanio, Hungario, Irlando, Italio, Kartvelio, Moldavio, Nederlando, Niĝerio, Pollando, Rusio, Slovakio, Svisio, Ukrainio.



La logo de IJF 2009.

Tertremo en La-Aglo kaj nuligo de la festivalo

Lunde, la 6^{an} de aprilo 2009, je la tria horo matene, la abruca ĉefurbo La-Aglo (itale *L'Aquila*) kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj estis frapitaj de aparte grava tertrema skuo. Krom faligi la plejparton de la domoj en la historia mezepoka urbocentro de La Aglo, la tertremo mortigis (laŭ postaj taksoj) preskaŭ 300 homojn, kaj senhejmigis (dum la unua tago) pli ol kvindek mil.

La festivala urbo, Giulianova, ne estis severe trafita de la tertremo. Jam dum la vespero de lundo, tamen, la estraro de IEJ eklernis neoficiale pri la ebleco ke la polico loĝigu senhejmigitajn el la tertremita regiono en la festivalejon. La novaĵo iĝis realaĵo marde matene, kiam la estraro lernis, ke estis alvenintaj en la festivalejon plimalpli naŭdek senhejmigitaj maljunulinoj el malsanulejo damaĝita de la tertremo. La estro de la festivalejo disponigis al IEJ 11 dormlokojn (kontraŭ la antaŭviditaj 115) kaj neniun kongresan ĉambron (kontraŭ la antaŭviditaj 6).

La estraro de IEJ tial devis neatendite nuligi IJF-n, je la unua fojo dum 33 jaroj. IEJ tuj dissendis informilon al la aliĝintoj kaj ekprovis kontakti ilin per ĉiuj rimedoj, inkluzive de Vizaĝlibro, Informitale (retpoŝta dissendolisto de IEJ), kaj vortotransigo inter esperantistoj. Konsciente, ke la nuligo kaŭzis apartan miskomforton al la aliĝintoj, IEJ ege bedaŭras kaj oficiale pardonpetas pri la okazaĵo, kiun kaŭzis la neatendita tertrema katastrofo.

Volontula agado de IEJ

Kiam la estraro kaj aliaj volontuloj de IEJ atingis la festivalan urbon, evidentiĝis la ebleco, ke oni povu kontribui al la helpado de la frapitaj urboj per kolektado de manĝaĵoj en amasvendejoj. Tion ebligis la laboro de Massimo Ripani, estrarano de IEJ loĝanta en Teramo, kiu kontaktis la lokan Civitanan Help-Organizaĵon por lerni pri la bezonataj rimedoj kaj interkonsenti pri la maniero liveri la kolektitajn varojn.

IJF-teamo dividiĝis en tri grupojn, kiuj atingis tri malsamajn amasvendejojn kaj interkonsentis kun ĝiaj estroj pri la ebleco starigi la kolektadon. Estis preparitaj skatoloj kun la simbolo de IEJ, kaj la dulingva skribaĵo *"Generi di prima necessità" - "Rimedoj por tuja neceso"*. En la amasvendejoj, oni prezentiĝis al la enirantoj, kaj kolektiĝis la donacojn el la elirantoj.

La loĝantoj de Giulianova, verŝajne pro la proksimeco al la frapita provinco, montriĝis aparte donemaj. Pluraj homoj rakontis pri amikoj kaj parencoj mortigitaj aŭ senhejmigitaj de la tertremo. Ne malmultaj estis mem volontuloj el lokaj asocioj, kaj interesiĝis pri la Itala Esperantista Junularo.

La kolektitaĵoj

Post atenta inventaro de la enhavo de la naŭdek skatoloj kolektitaj, montriĝis (inter alie) la jenaj kvantoj da donacaĵoj fare de la giulianovanoj:

- 455 kg da pastaĵo (italaj nudeloj)
- 58 kg da rizaĵo
- 53 kg da sukero
- 13,5 kg da salo
- 120 l da lakto
- 100 kg da ladskatolaj legumenoj
- 120 kg da ladskatolaj tomatoj
- 30 kg da alispecaj ladskatolaj manĝaĵoj
- 48 l da oliva oleo
- 40 l da fruktosuko

Por la infanoj, estis ankaŭ aparte kolektataj porinfana lakto kaj manĝaĵoj (homogenaĵoj), biskvitoj, tukoj kaj vindotukoj.



La ŝildo kiu reklamis ĉe la giulianovanoj pri la bonfara kolektado de aĉetaĵoj fare de IEJ.



Francesco kaj Francesca de IEJ kolektas donacojn ĉe la elirejo de amasvendejo.



Kelkaj el la kolektitaĵoj.



La skatoloj kun la ŝildo de IEJ estas transportataj sur veturilon.

Monkolekto

Por ke ĉiuj, en kaj ekster Esperantio, povu oferti sian helpon al la frapita regiono Abruco, reveninte el la festivalurbo Itala Esperantista Junularo kaj Itala Esperanto-Federacio starigis bonfaran monkolekton kiu celas ekonomie helpi la rekonstruadon de la urboj trafitaj de la katastrofo. La monkolekto, nomita "IEJ/IEF - HELPE AL ABRUCO", daŭras ĝis la 30^a de aprilo 2009. La kolektatan sumon oni tiam transdonos al la itala Civitana Help-Organizaĵo. Pri la monkolekto oni detale rakontas en la retpaĝaro de IEJ, ĉe la adreso <http://iej.esperanto.it>.

Por sendi siajn kontribuojn

Bankkonto: Federazione Esperantista Italiana - sezione giovani

Numero: 932107

Landokodo: IT

Kodo BIC/SWIFT: MEDBITMM

Banko: BANCA MEDIOLANUM

ABI: 03062 - CAB: 34210

Loko: Basiglio

IBAN: IT84T0306234210000000932107, CIN: T

Motivo de la pago: "HELPE AL ABRUCO"

UEA-konto: ieja-z

Motivo de la pago: "HELPE AL ABRUCO"

Notoj.

- Ĉiuj tiuj, kiuj jam sendis antaŭpagon por la Internacia Junulara Festivalo 2009 en Giulianova, nuligita pro la neceso gastigi senhejmigitajn en la festivalejo, povas helpi nian monkolekton rezignante la redonon de la antaŭpago. Interkonsentu pri tio kun la kasistino de IEJ Elina Koryak ([elina.koryak](mailto:elina.koryak@gmail.com) ĉe [gmail.com](mailto:elina.koryak@gmail.com)).
- Ĉiuj tiuj, kiuj deziras ke sia nomo (aŭ plumnomo) estu publikigita en la paĝaron de IEJ, sendu detalojn pri la donitaĵo per la tiucela formularo kiu troviĝas ĉe <http://iej.esperanto.it/tertremo2009>.